# Novaĵoj Tamtamas

**Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)** エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Okazis

## Partopreno en «Earth Festa Kanagawa»



Estis komuna evento de multaj internaci-rilataj volontulaj organizoj en Gubernio Kanagawa, havinta lokon ĉe "Earth Plaza" en Jokohamo, en la 29a kaj 30a de novembro. Tien ni el Jokohamo kaj Esperanto-Societo de Kawasaki kune partoprenis.

Kun budo, ni informis pri Esperanto, sed iom alie ol kutime: ni al interesitoj prezentis kvizon pri Esperanto, kaj por pliaj interesitoj proponis utiligi Esperanton — "Faru vian ŝatatan «ali-nomon» per Esperanto, utiligante Japanan-Esperantan Vortaron!" Al la partoprenintoj ni donacis ĉokoladopecon, volbitan per kovrilo kun desegno de besto (laŭ s-ino Miyazaki Hideko), kaj ties esperanto-nomo. Ĉirkaŭ sesdek personoj partoprenis.

Cetere estis ekspozicieto de «la unua lernolibro de gepatra lingvo», kolektita per tutmonda esperantista reto : inkluzive de svahila, kazaĥa, amerik-hispana (el Ĉilio) ktp.






Esperanto Jokohama

■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)
■ Redaktejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)

## Eseo

# Mia pilgrimado en Jokohamo

**Cho Sung Ho**



De kiam mi konatiĝis pri establiĝo de la Esperanto-Muzeo Jokohama, ekĝermis en mia koro deziro viziti la 'sanktejo'n kaj trarigardi ĝiajn trezorojn. Intertempe mi kontribuis al la muzeo per tri libroj de mi verkitaj, kun espero helpi, kvankam nur iomete, al ĝia iama kompletigo. Estante longtempa leganto de Novaĵoj Tamtamas, mi ankaŭ sendis iujn el ĝiaj numeroj, kie aperis la raporto pri legokunsidoj, al la verkisto Sten Johansson, kiu kolektas recenzojn pri la originala Esperanto-literaturo en sia retejo. Tiamaniere mi preparis interamikiĝon kun Hama-Rondo, jam de jaroj miaflanke.


Finfine, komence de novembro, mi kaptis la okazon de mia prelego ĉe JEI por realigi mian revon ekpilgrimi. S-ro Sibayama, kiu verŝajne deĵoris tiun tagon nur por mia alveno, bonvenigis min kun afabla rideto malgraŭ mia malfruiĝo. Post kiam ni kune lunĉis, li gvidis min inter bretaroj kaj stakoj da libroj kaj broŝuroj, plaĉodoraj je malnova papero. Iom poste s-ro Namba kuniĝis kaj ni triope pasigis tre agrablan tempon interparolante pri gamo da movadaj aferoj. Ne nur kolektaĵoj elmontritaj, sed ankaŭ la hejmeca, komforta etoso de la muzeo, kiu estas efektive modifita loĝdomo, entute liveris al mi plezuregon, kio ĉio tuj gravuris en mi rememorojn neforgeseblajn. Eĉ la laŭta sono de preterpasantaj trajnoj!


## EL NIA MUZEO

### "Korea Esperantisto n-ro 1" en 1937

Nia Muzeo posedas ekzempleron de "Korea Esperantisto n-ro 1", eldonita de Korea Esperantista Asocio en Seoulo, en siatempa Koreio regata de Japanio. La gazeto, tamen ne povis aperigi la n-ron 2 — tiel mi aŭdis de s-ro Cho Sung Ho vizitinta nian Muzeon. Ĝi estas 24-paĝa, kaj kiel ni vidas en ĝia enhavo, verkita de koreaj kaj japanaj samideanoj. Ĝiaj artikoloj estas movada, lingva aŭ literatura. Sur la dorskovrilo estas komerca reklamo.

Ni aparte prezentas duonpaĝan artikolon : «Kanto de Radio-Gimnastiko»





ENHAVO
Redakcia Saluto ........ H. Ŭ. Hong ... 1
Vortaroj kaj Gramatikoj de la Korea Lingvo ........ J. Okamoto ... 5
........ E. Ĉ. Balenego ... 2
Granda ĝojo ........ Z. Tojokaŭa ... 3
Saluto ........ Walter Poppek ... 4
Al mia kara amiko H. en la ekstrema oriento ........ C. M. Li ... 8
La indigno de l' Anĝelo ........ H. S. Eŭm ... 10
Dum dekkvin minutoj ........ Ĉ. Ŝirouĉi ... 14
Kanto de Radio-Gimnastiko ........ H. Ŭ. Hong ... 15
Pioniroj en vilaĝo ........ I. S. Kim ... 20
Amo vokas ........ S. F. Montego ... 14
Tigro kaj vulpo ........ 21
Redakcia Angulo

# Kanto de Radio-Gimnastiko

Radio-sendita antaŭ jaroj

Trad. de Ĉ. Kastelo

Matensun' bele dancas kaj lumiĝas ĉirkaŭ ni;
Nu fleksu kaj etendu forte nian brakon nun;
(rekantaĵo) : Jen radio vokas nin, unu du tri.
* * *
Vice sur rosa tero bonodora paŝas ni;
Nu saltu, gaje dancu per la sanaj kruroj nun.
* * *
Freŝa vent' nin karesas kaj nebulo kisas nin;
Enspiru kaj elspiru la aeron puran nun.
* * *
Kiam ni salte, dance nin ekzercas, en akord'
Ja vigle kaj serene dancas tero kaj ĉiel'.



(artikolo el "Korea Esperantisto n-ro 1, 1937")

# Birdo-observado

**Mizro Iwaya**

Mi komencis observi birdojn kaj aliĝis al Japana Sovaĝbirda Societo antaŭ ĉirkaŭ 30 jaroj. En tiu tempo mi konis nur paseron, kolombon, korvon kaj iom da aliaj birdoj. Sed kiam mi atente rigardis mian ĉirkaŭon, mi trovis aliajn nekonatajn birdojn unu post alia; hipsipeto, motacilo, paruo, sturno, zosteropo kaj aliaj. Fakte ili estis ĉirkaŭ ni, sed mi ne estis ilin rimarkinta. Kiam mi atente rigardis, mi unuafoje trovis ilin.

Mi montros kelkajn el rimarkindaj birdoj en japanaj urboj.

*hipsipeto (el piknonotedoj) ヒヨドリ
Trovebla ĉie en urboj, japana specifa speco. Ĝi venas ankaŭ al mia balkono. Sed tiu ĉi nomo ne



aperas en Vikipedio. Eble japanaj esperantistoj-birdoamantoj ne redaktas tiun parton.

*(blanka) motacilo ハクセキレイ
Trovebla sur urbaj stratoj, precipe apud marbordo. Ĝi ofte svingas la voston.



*(granda) paruo シジュウカラ
Trovebla ĉefe sur montetoj. Ĝia pepado sonas laŭte aŭdebla el montoj en printempo.



*(griza) sturno　ムクドリ
Trovebla ĉefe sur kampoj kaj parkoj. Ili amase marŝas en tirmo. Ili ofte staras sur elektra drato en granda amaso.



*zosteropo　メジロ
Troveblas precipe kiam floroj malfermiĝas en printempo. Blankaj ringoj ĉirkaŭ la okuloj estas ĉarmaj.



(Ĉiuj birdoj estas fotitaj de la aŭtoro mem.)

Aliaj birdoj estas ne montritaj ĉi tie, ĉar ilia ofteco fariĝas pli kaj pli malgranda. Kiam mi ne sciis tiujn nomojn, mi preterlasis ilian ekziston en Jokohamo. Sed post mia ekscio ili certe troviĝis ĉirkaŭ mi en la urbo.

La plej proksima vojo al konatiĝo kun ili estas t.n. kunveno de birdoserĉado. La lokaj grupoj de la Societo anoncas ĝian okazigon kaj volontuloj kolektiĝas sur la montrita loko. Ili komencas promeni laŭ la gvido de veteranoj. Ni komencantoj facile preterlasas subtilan ekziston de birdoj, sed veteranoj tre atente rimarkas ilin kaj sciigas al ni ilian ekziston kaj nomon. Jen kelkaj famaj lokoj en sud-Jokohamo.

Parko Kuraki ( 久良岐公園 ): Ĝi troviĝas inter la stacidomoj Kamiooka kaj Isogo, apud la vojo Sasage-Kamariya. Ĝi estas relative granda parko en Jokohamo kaj ni povas ĝui promenadon en ĝi. Dum la promenado ni povas trovi supre montritajn birdojn krom aliaj maloftaj birdoj. Ĝi havas lageton. Do ni povas trovi ankaŭ akvobirdojn kiuj venas al Japanio en vintro, ĉefe anasoj.

Naturobservejo de Jokohamo ( 横浜自然観察の森 ): Ĝi estas pli ordigita monto ol natura parko, konstruita en 1986. Ĝi havas domon de gastoj kaj oficistoj, kie konstante oficas profesiaj gardistoj. Kiam oni havas kunvenon de birdoserĉado, oni povas ĝui ne nur birdojn sed ankaŭ plantojn abunde troveblajn tie laŭ la sezonoj.

Sankeien ( 三渓園 ): Fama parko de Jokohamo. Iom malproksima de mia domo, sed la enhavo estas bunta. Okazas diversaj eventoj en ĝi, kaj mi ofte vizitas ĝin. Ankaŭ birdoj multe aperas tie. Precipe akvaj birdoj amasas sur la Granda Lageto. Precipe en vintro diversaj anasoj venas el la nordo kaj naĝas sur la lageto.

Kiel aliaj hobioj mi tute ne aktivas kaj ne partoprenas en birdoserĉa kunveno lastatempe, bedaŭrinde.

## sezonvorto decembra

### Ostroj　牡蠣

**Okita Kazumi**



La ostroj, ofte nomataj “la lakto de la maro”, estas nutraĵo riĉa je diversaj nutraĵoj en bona ekvilibro.

La plej bongusta sezono de la jaro estas de decembro ĝis februaro ĉar ili enhavas multe da glikogeno.

Oni povas manĝi ilin gustigante per manĝa vinagro aŭ citrono, kaj ili taŭgas ankaŭ por diversaj pladoj kiel frititaj ostroj, *zosui* (riza supo) aŭ ostro-poto.